

ESPERO KATOLIKA

Oficiala monata organo de la Internacia Katolika Unuiĝo, Esperantista (I.K.U.E.) fondita de Abbé Richardson en 1910 en Parizo.

Redakcio kaj administracio: Espero Katolika-VLEUTEN (Utrecht). Nederlando. Jarabono f 4.50 aŭ samvaloro.

Kunlaborantoj: d-ro E. J. Görlich (Aŭstrujo), Robert Ernst, sac. (Belgujo) Ludwig Thalmaier, sac. (Germanujo.) J. Vernoux, sac. (Francujo.) Eusebio. Maynar (Hispanujo), Prof. H. G. Wannemakers S. J., G. Ellerman kaj d-ro W. J. A. Manders (Nederlando), d-ro W. Solzbacher (Usono).

P A S K O

*‘ Mors et vita duello
Confluxere mirando
Morto kaj vivo duellis
Mirige interbatalis.*

For estas la vintra sezono, la printempo sin anoncas en mildverdaj koloroj kaj kun riĉkoloraj floroj. La malhelo devis cedi sian regnon al la lumo. La homoj sin vestas pli agrable, forlasas la anguleton ĉe la forno kaj eniras, la lumon de la suno, kiu vekas la tutan naturon al nova vivo. Denove la nederlanda provinco Zelando pruvis la realecon de la devizo de sia blazono ‘Luctor et Emergo’ (Mi luktas kaj Elmergiĝas). Eŭropo vundita de multjaraj militoj sin erektas kaj batalas por sia memstareco, unueco kaj estonteco. La Sankta Eklezio antaŭeniras en liturgiaj solenoj. Eĉ gi konformas ilin al la moderna tempo, lokante la liturgiajn solenojn en la nokto, por ke plej multe da kredantoj ĉeestu, por ke la graco de la Paska Festo disradiu plej vaste en ĉiaj koroj.

Ni devas bedaŭri ke la kristana spirito malaperas dum ĉi tiuj tagoj. La religiaj festoj ŝanĝiĝis en mondumaj festoj. Forĵetante la sekvojn de la origina peko, oni forĵetis la konvinkon pri la postmorta vivo. La vortoj de S-ta Paŭlo, ke la reviviĝo de Kristo estas la garantio de nia reviviĝo, ke ni devas morti kun Kristo por kune kun li reviviĝi, tiuj vortoj ne plu trovas ĝeneralan resonon en ĉiuj homoj. Ni katolikoj, kiuj laŭ la Papa aserto estas tre adaptaj por la internacia vivo, kaj speciale ni katolikaj esperantistoj kiuj certe konscias pri la rolo de internacia komprenigo en la servo al la internacia paco, NI SINCERE DIRU: PACO AL VI!

J.

" P a x V o b i s ! "

*Post la reviviĝo el tombo kaj morto
Estis de l' Savinto unua vorto:*

‘Paco estu jen al vi!’

*KRISTO ankaŭ nun ĉi vorton diras
Kvankam paco-malproksimen iras
Homa gento, for de Di’.*

*Kiom riĉa estas do kristano:
Pacon, kiun mondo ne doni povas,
Li en sia koro per Kristo trovas,
Ankaŭ dum batalo kaj uragano!*

*Kaj la Paska beno evangelia
Etendiĝas tra la regno Dia,-
Fratoj! Helpu ni per preĝo, faro,
Ke retrovu Kriston la homaro!*

Walter Mudrak.

La konferenco de la prezidantoj de internaciaj Katolikaj organizoj

Okazis en Romo de 8 - 11 Marto 1953. Dudeknaŭ organizoj sendis siajn reprezentantojn el 30 landoj; I.K.U.E. estis reprezentata de Rev. Patro M. Caroli, O.F.M. Post la S. Meso celebrata de Lia Kardinala Moŝto Giuseppe Pizzardo en la vaticanaj grotoj, kaj dum kiu la Kardinalo substrekis, ke en ĉi tiu tre malfacila tempo precipe la laikuloj forte devas kunlabori al la kristanigo de la Socio, speciale per la instruado de la junularo, okazis la solena malfermo de la kunsidoj en la Palaco de la Apostola Kancelario. Partoprenis 4 Kardinaloj, inter kiuj Iliaj Kardinalaj Moŝtoj Celso Constantini kaj Giuseppe Pizzardo, kaj diversaj Episkopoj; la Ambasadoroj kaj Ministroj de multaj landoj kaj aliaj reprezentantoj de la Diplomata Korpuso kaj de la UNESCO, kaj multaj ekleziaj kaj laikaj aŭtoritatuloj ĉeestis.

La prezidantino, Sinjorino De Camillis bonvenigis la ĉeestantojn en la franca kaj itala lingvoj, kaj skizis la historion kaj la laborojn de la O.I.C. (Organizoj Internaciaj Katolikaj) de post sia fondiĝo en 1927. La proponitan laborplanon kunmetis la Permanenta Sekretariato de la Konferenco kaj ĝi sekvis du grandajn direktivojn, nome: la diskutado de la ĝenerala rilato de la okazinta aktiveco kun la esploro de eventualaj ŝanĝoj, bazita sur la spertoj dum la pasinta jaro, kaj la pristudo de ĝenerala temo: 'La internaciaj katolikaj organizoj kaj la nuna mondsituacio, kun konkretaj bazoj por la estonta laboro de la Konferenco.

Nun Mons. Giuseppe Sensi laŭtlegis longan leteron, kiun sendis Mons. Giovanni Battista Montini, Pro-Sekretario de Ŝtato en nomo de la Sankta Patro al la prezidantino de la Konferenco. En tiu letero estas esprimita la deziro de la Papo, ke la Katolikoj kiel eble plej multe konlaboru por estigi la unuecon internacian. Ĉar estas la unua devo kiu koncernas ĉiujn kristanojn: kunhelpi por krei atmosferon de reciproka kompreno kaj respekto, sen kiu neniu internacia agado povas posedi profundan bazon nek daŭran estontecon. La katolikoj estas speciale kapablaj por tia klopodo, ĝuste pro sia kredo, ĉar ne ekzistas unu homa grupo kiu prezentas tiajn favorajn kondiĉojn, en vasteco, kiel en profundece, por la internacia interkonsento. (Tie ĉi ni atentigas ankaŭ je la artikolo de Patro Wannemakers en nia gazeto de Marto - red. E.K.) Sekvis la inaŭgura parolado de Kardinalo Constantini pri la tasko de la porlaikula apostolado. Li speciale subtrekis la neceson de laboro sur la socia tereno, ne laŭ materialista ideo, sed levante la homon super la materialistan koncepton, defendante kaj evoluante en li lian divinan vokacion, sub la kompatema patreco de Dio, en la ligilo de bona fratneco.

'Vi devas pristudi la specialajn manierojn por liberigi kun apostola kuraĝo, laŭ la grandaj direktivoj de la gloire reganta Papo Pio XIIa, la suferantajn klasojn, uzante la plej efikajn rimedojn por starigi pli konvenan socian justecon en la ligilo de la universala fratneco kaj rilate al pli konscia paco inter la homoj.' Parolante pri la misiaj landoj Lia Kardinala Moŝto atentigis je la fakto, ke oni ne devas prediki la naciismon, kiu naskiĝas el la malamo al alilandanoj, sed la kristanan patriotismon, kiu naskiĝas el la amo kaj senco de la justeco: amo kaj justeco por la familio; amo kaj justeco por la patrolando kiel pli granda familio; tiu amo ne haltas je la limoj de la nacio, sed etendas sin kaj ĉirkaŭbrakas la eksterlandajn naciojn en la ligilo de la homa solidareco kaj la kristana frateco. 'La naciismo provokas la militon, la kristana patriotismo akcelas kunvivadon kaj interŝanĝon inter la diversaj nacioj, forpelante la flagelilon de la milito, kaj ni, sekvantaj la instruojn de Lia Sankteco Pio XIIa, devas kaj volas labori por la paco.' Post multaj aliaj parolantoj, kiujn ni en ĉi tiu konciza raporto ne povas citi, dum la lasta kunveno sinjoro Bonard Ducret, sekretario de la Internacia Movado de Katolikaj Studentoj, laŭtlegis raporton, kiu substrekas la ĉiam pli urĝan neceson de l'ĉeesto de la katolikoj sur la mondkampo, konsiderante la kreskantan evoluon de la internacia vivo. La internacia problemo estas la fundamenta problemo de la XXa jarcento, kaj en la procedo de la unuigo de l'mondo la katolikoj povas akceli orientigan funkcion kiŭ logike naskiĝas el tiuj du neneigeblaj elementoj de l'Kristaneco: la universeco de l'kredo kaj la amo al la proksimulo.

LA NOVA EGIPTUJO

Ĉiuj tagoj la ĵurnaloj detale raportas pri la ŝanĝiĝintaj situacioj en Egiptujo de post la antaŭa jaro. Ĉu la revolucio ankoraŭ daŭros kaj metas finon definitivon al la reĝa dinastio, ni ne povas profeti. La gvidanto de la revolucio, la konata generalo Mammoed Naguib, diras nenion pri tio. Ĉiuokaze tamen li ĵuris forigi la korupton de ĉiaj medioj kaj la subpremadojn de la laboranta homo profite de la feodalaj terposedantoj. Kaj se li sukcesos en tiuj aferoj, la lando estos al li tre danka.

Speciale tamen ni estas scivola al lia sinteno rilate la kristanojn, katolikoj, ortodoksoj kaj protestantoj. La forigo de la influrika nacionalista partio de la Wafdistoj, kiu estis tre malamika al fremdaj religioj, donis esperon al ĉiuj kristanoj pri pli bona estonto.

La nova reganto jam montris per faroj, ke li konvinke intencas ne fari diferencojn pro raso, lingvo aŭ religio. Li estis tre danka pro la subteno, kiun li tuj ricevis el la kristanaj medioj. Unu el liaj unuaj faroj estis, viziti la katolikan kaj la ortodoksan patriarkon.

Je dimanĉo, la 10a de Aŭgusto 1952a, la estroj de diversaj religioj kunvenis en la stabejo en Aleksandrio, kie Tsejk de El-Azhar alvokis al paco inter ĉiuj religiaj komunumoj je la decida horo en la historio. Li subtekis:

‘Nur unu nerefutebla doktrino estonte devas esti leĝo en Egiptujo: Amu la proksimumon’. En la nomo de la generalo Naguib, la generalo Atef Nasser asertis, ke la nova reĝimo ne faros diferencojn inter la ŝtatanoj pro la religio kiun ili konfesas. Je merkredo, la 10a de Septembro, novjartago laŭ la kopta kalendaro, Naguib, akompanita de la Eksministro - prezidanto Maher, prezidis grandan feston en la ortodoksa Kopta Patriarkejo. Ĉiuj oratoroj de tiu tago parolis pri la unueco kaj la frateco inter ĉiuj Egiptoj sub la nova registaro. Neniam antaŭe la rilatoj inter la aŭtoritatuloj kaj la kristanaj religiaj estroj estis tiel akordaj.

Ĉe ĵurigo de kadetoj la generalo mem prezentis al la kandidatoj ĉu la Korano ĉu la Biblio, laŭ ilia religio. Tio ĝis nun neniam okazis en Egiptujo. En parolado en moskeo li memorigis al la soldatoj ke fanatismo estas la kontraŭo de religiemo, kaj ke kristanoj kaj mohametanoj devas esti traktataj laŭ la samaj reguloj. Kiam laboristoj plendis ĉe li ke ilia ĉefo estis judo, li severe respondis, ke li ne observis la religion de individuo, sed nur la servojn kiujn li faris al Egiptujo.

Dum la lastaj monatoj diversaj kristanoj ricevis la Egiptan naciecon, kiun oni antaŭe al ili rifuzis pro ilia religio. En la militista kampadejo de Abassieh kapelo estis konstruigita, ‘por ke la kristanaj soldatoj povu preĝi egalrajte kiel iliaj mohametanaj kamaradoj’, diris la generalo. Tio preskaŭ estas nekredebla en Egiptujo, se oni pripensas, kiom da peno antaŭe kostis por akiri la permeson al konstruado de preĝejo aŭ kapelo.

Ĝis nun la mohametanismo estis ŝtatreligio, kaj tio estis fatala por la libereco de la kristanoj. Jam parolas ne-kristanoj por forigi tiun malnovan institucion.

La socialista ĵurnalo Al-Ichtiraquia skribas: ‘La fabelo de ŝtatreligio estas heredaĵo de pratempoj de tiranio kaj feodaleco.’

Dependas multe ĉu la kristanoj de diversaj ritoj kaj sektoj konservos tiom da unueco en la agado por akiri la plenan liberecon.

(Laŭ p.F.Wijnhoven en ‘La Voĉo de l’Oriento’)

N i a 2 4 a.

Ĝis la 25a de Marto pasinta sin anoncis 50 partoprenontoj al nia 24a.

El Francujo 16; el Nederlando 14; el Belgujo 2; el Germanujo 6; el Italujo 3; el Aŭstrujo 2; el Saarlando 1, el Usono 2 kaj el Hispanujo 4.

El Parizo oni vojaĝos karavane per aŭtobuso laŭ Limoges, Rocamadour, Retur- ne laŭ Bordeaux, Angoulême kaj Oleans. Informoj ĉe f-ino J. Le Boedec 18 r. Ern. Cresson, PARIS 14. Se ne sufiĉe da partoprenontoj sin anoncos oni vojaĝos karavane per la vagonaro.

El Nederlando certe vojaĝos karavano per aŭtobuso! Informoj ĉe s-ro De Jong.

A l k o m u n a c e l o

En antaŭa artikolo ni eksplikis ke studado kaj scio pri la evoluo de la internacia vivo estas necesaj por la enkonduko kaj aplikado de Esperanto. Ekzemplon de studo-materialo ni ĉerpas el parolado de Papa Moŝto Pio XII. En aŭgusto 1952 en aŭdienco por la partoprenantoj de studa kongreso de la Itala Katolika Agado en Kastel Gandolfo la Papo diris:

‘La Katolikoj estas vokataj batali per ĉiuj fortoj por venki la korpemajn naciajninteresojn kaj por orgenizi - kie ajn tio eblas - fratajn renkontojn de homoj el diversaj nacioj. Tiaj renkontoj ĉiam okazu en spirito respektanta la propran kulturan vivon de la unuopaj landoj’.

‘La Katolikoj estas tre kapablaj formi kaj konservi tiun spiritan sferon, sen kiu reala internacia unueco ne povas daŭri; nome la spirito de ambaŭflanka kompreno kaj estimo, do de tiu kristana amo, kiu vidigas fraton en ĉiu homo el kiu ajn nacio aŭ raso.

La ideo pri infaneco de Dio, kiu tiom profunde estas ankrumita en la Katolika Kredo, instigas la membrojn de nia Eklezio vidi ĉiujn homojn kiel kreitojn de nia Plej Supera Sinjoro; ĉiuj estas vokataj al la eterna savo, por ĉiuj estas nia amo kaj nia preĝo.

‘Al la plej bonaj fundamentoj de la vivo apartenas la benoj de nia kulturo. Sed ni gardu nin kontraŭ danĝero! Ŝtatoj kiuj deziras nur la fruktojn de ĉi tiu granda spirita heredaĵo kaj samtempe en sia nacia vivo publike aŭ sekrete malzorgas pri la vera enhavo kaj pri la postuloj de la kristana kulturo, necese ruiniĝos ĝis stulta materialismo. Kien povas konduki tia evoluo klare montras la plej moderna historio.’

‘Vi, Katolikoj, filoj de la Eklezio, kiuj ne formas malgrandan aŭ malfortan grupon en la nuna Eŭropo, vi havas la sanktan devon kontraŭi tiujn tendencojn. Vi plej bone servos la estontan Eŭropon, se vi konservos la radiantan povon de la vera, malnova kristana kulturo, kiu radikas en nia Katolika Kredo, kaj se vi zorgas ke ĝi povos ekzerci siajn elpratempajn rajtojn en la Okcidento.’

La vortoj de la Sankta Patro senpere koncernas la Italian Katolikan Agadon; sed estas klare ke ĝia signifo estas pli ĝenerala kaj valoras por la tuta Katolika Agado de la mondo. Ĉi tiu lernas el la parolado ke la internacia kontakto - kiel inter kristanaj fratoj - urĝe necesas en niaj tagoj kaj postulas ‘batali per ĉiuj fortoj’. Eĉ trans la limojn de la K.A.-anaro tiuj vortoj estu aŭdataj, ĉar la S. Patro simple asertas ke ‘La Katolikoj, estas vokataj’ al tiu batalo.

Tiel la alvoko al internaciaj renkontoj ne nur estas papa pravigo de la longa serio de niaj internaciaj katolikaj esperanto kongresoj, sed ĝi ankaŭ povas esti instigo organizi la estontajn kongresojn kiel plenumon de tiu alvoko - krome ĝi klare indikas la celon kaj la gvidantajn normojn por tiu kontakto. Ĉu ankoraŭ necesas atentigi ke tiuj samaj, pure katolikaj principoj montras la ekzistrajton de nia propra katolika Esperanto movado kiel elirpunkto por kunlabori kun ĉiuj Esperantistoj?

Sur internacia tereno krome montriĝas io komuna laŭ celo kaj metodo ĉe la Katolika Agado kaj la Katolika Esperanto Movado.

Sendube tiuj ĉi vortoj de la S. Patro estas studataj, komentariataj, pripa-rolataj en la diversaj rondoj de la Katolika Agado. Ni do prave povas direkti ilian atenton al la papa parolado kiam ni serĉas kontakton kaj donas informojn pri la faciligaj eblecoj de Esperanto sur tiu tereno. Precipe la Esperantistoj kiuj estas membroj de la Katolika Agado povas plenumi gravan taskon!

H.G. Wannemakers, S.J.

VERONA J JUELO J.

La kanonikara Biblioteko

(Biblioteca Capitolare)

Panteonoj, piramidoj, nekropoloj, maŭzoleoj, tombejoj, temploj, oferbuĉoj, bruloferoj realvokoj sur la tomboj estas sendube la universalaj atestoj kiuj kondukis la homon kredi en la senmortecon, sed dum malrapide disvolviĝas la irado de la vivo, memorigaj paĝoj eĉ pli vivaj kvankam velkitaj pro la tempo, pleniĝas nin je miro ĉiufoje kiam ni troviĝas antaŭ tiuj maloftaj restaĵoj - ŝajne mutaj voĉoj de la jarcentoj - kiujn Verona gardas en tiu belega relikvaro de arto, spiritaj valoroj kaj eminenta penso kia estas la antikva kanonikara biblioteko (la 'Capitolare' kiel ĝi estas kutime nomata) ankoraŭ nun amezorgita de sindona kolektanto, Mons. Jozefo Turrini, tre inda daŭriganto de tiu aro de neforgesindaj gardantoj kiuj antaŭiris lin en la direktado de tiu biblioteko.

Antikva, severa, mirinda ĝi estas la 'Capitolare'.

Estiĝinta dum la IX. jc. fare de Ĉefdiakono Pacifico, ĝi estas nun riĉa je tre valoraj kodoj el multformaj fakoj: historiaj, artaj, religiaj.

Tiu ĉi jarcenta biblioteko efektive kolektiĝas ĉion kio estas plej multvalora laŭ antikveco kaj malofteco, kaj pro miniaturo; ĝiaj kolektoj - oni povas certigi ne timante kontraŭdiron - estas unikaj en la mondo, kaj traktas pri patristiko, biblio, klasikismo kaj, precipe, liturgio.

Speciala sidejo konstruata en 1727-28. laŭ projekto de Ludviko Perini, poste plivastigita en 1781., fariĝis konservejo de la plej oraj donacoj, kiujn, nekomparebla intelekta aristokrataro lasis al ĝi kaj, jarcento post jarcento, kontribuis riĉigi kaj ornami ties salonojn.

Poste, dum epoko al ni tre proksima, la apokalipsa detrua forto de la milito, malrespektis eĉ tiun ĉi juvelon de arto kaj klereco. La kanonikara biblioteko estis terure frapita kaj ĝiaj belaj salonoj, ĝiaj mirigaj kolektoj, ĉio kio formis la fierecon de la Veronanoj falegis kaj fariĝis amaso da rompaĵoj kiu ŝajnis ne reparable, je senlima ĉagreno de la ĵaluza gardanto de tiu malofta trezoro kaj je bedaŭro de la tutmondaj lernantoj kiuj estis jam vidintaj kaj admirintaj la kodojn, la pergamenojn, la manuskriptojn.

Mons. Turrini, tamen, maldorme kaj persiste kiel lia pasio pri tiuj maloftaj restaĵoj, ne malesperis, eĉ kiam li vidis antaŭ si tiom grandan ruinamason. Al li do apartenas la merito, la tre alta merito, pro la pacienca regajno de la disperdita materialo, de la domaĝitaj paĝoj; pro la tre akurata kaj mirinde ama zorgo pri ĉio; pro la akcelo per kiu li antaŭenpulis la rekonstruon de tiu disbatita templo de memorindaĵoj.

Kaj je la 28a de Septembro 1948a pro ekskluziva merito de ties firme vola direktoro, la, reviviĝinta kvazaŭ pro Dia volo, rekonstruita kanonikara biblioteko estis solene inaŭguraciata.

Hodiaŭ la vizitanto de tiu biblioteko, retrovas, rekonas, pecon ĉe peco, tion kion li estis jam admirinta antaŭ la malsaĝega mondkonflikto.

Ĉio ŝajnas kvazaŭ ĵus prenita el sub vitra kloŝo ŝirminta kontraŭ la polvo de l' tempo! Sed ni scias tamen kiom da laboro, pacienco kaj peno kostis la savo de la libroj, de la manuskriptoj, de la multvaloraj kolektoj (donacoj de Scipione Maffei, Fr. Bianchini, G. Dionisi, Gius. Muselli, Mons. Morosini Episkopo de Verona). - el la erozia agado de la morteraĵo, de la malseko, de la ŝimo.

Miksitaĵoj kun ŝtonaĵoj, superŝutitaĵoj, je polvamaso, disŝiritaĵoj pro splitoj tiuj ĉi memoraĵoj - kiuj hodiaŭ ŝajnas eĉ ne tuŝitaĵoj - aperis tiam tute ĉifaj kaj disligitaj.

Miraklo okazis do inter la 4a de januaro 1945a - dato de la furioza detruo kiu terenfaligis la konstruaĵon - kaj la 28a de septembro 1948a, dato de la solena inaŭguracio de la rekonstruita ejo.

Kaj nun, rapida esploro - bedaŭrinde nekompleta, ĉar tro granda estas la kvanto de la materialo tie ekzistanta - de la eminentaj verkoj kiuj igas multa kaj mirigita la vizitanto.

Dekkvarmil pergamenoj kolektitaj kaj konservitaj de post 710a: bulloj kaj diplomoj de Papoj kaj Imperiestroj; manuskriptoj de Fracastoro; famaj palimpsestoj kiel la 'Virgilio' kaj la 'Eŭklido' de la IVa kaj Va jc., miregigaj kodoj, inter kiuj, unika fonto por la studado de la roma juro, la 'Gajo'. (Va/jc.).

La 'Evangelario purpureo' de la Va jc., vera juvelo, tute skribita per oraj kaj arĝentaj literoj sur tre delikata purpura pergameno.

Alia unika liturgia kodo estas la 'Sacramentarium Leonianum' de la VIa jc. kaj same maloftaĵo la 'Sacramentarium Wolfkangi' (Xa jc.) de la Ratisbona skolo kun kelkaj paĝoj skribitaj je alternaj linioj oraj kaj arĝentaj.

Tre alte taksindaj la miniaturoj kaj la bindaĵoj de la manuskriptoj 'Corvini' devenantaj de la biblioteko de la hungara Reĝo Mattia Corvino. (XVa jc.).

Kolosa verko estas krome la grupo de dek ses dikaj pergamenaj volumoj miniaturpentritaj de l' Verona pentristo Turone en la XIVa jc.

Inter la bibliografia materialo presita montriĝas ankaŭ multvaloraj inkunabloj.

Kaj tio ne estas ĉio, la kanonikara biblioteko konservas ankaŭ muzikajn verkojn antaŭajn al 1630a, el kiuj multaj, eble, ne konataj de la bibliografiistoj.

En la nove rekonstruita sidejo estas ankaŭ gardataj belega kolekto de skulptaĵoj, inter kiuj grandegvidiĝas la fama busto de Homero; kolekto de antikvaj muzikiloj, tombŝtonaj fragmentoj, enskribaĵoj, moneroj, emajloj, kameoj, medaloj, multaj objektoj de la primitiva Verona eklezio, unu ebura konsula diptiko el 517a.

Apud la biblioteko-freskitan de Heleno Gazzola-Schiavi - oni povas admiri kapelon speciale konstruitan kaj dediĉitan al tre sankta Virgulino, sub la titolo 'Sedes Sapientiae' ilustracia sanktejo de Ĉefdiakono Pacifico, la granda intuicia, genia elpensinto de tiu ĉi belega biblioteko, je kies memoro - en la renaskita sidejo - estis de nove lokita la valora statuo kiu lin rememorigas, verko kaj donaco de skulptisto Luigi Spellini.

Tiu solena figuro, kiu ŝajnas rezumi en si la dignecon de la loko kaj la sugeston de la spiritaĵaj valoroj, arte elmontritaj ĉirkaŭe, posedas multepovan esprimon, fidele respeguligantan la 'majeston de la klerulo el la multaj animoj'.

(el la originalo de prof. Poggi tradukis ALER)

LIBRO - ELEKTSERVO

(estro: P. J.F. Smeehuyzen s.c.j.)

(Daurigo de la librelektilo 1950)

DA SILVA, Pro tri pingvenaj ovoj - de Freitas - A, V, 91.

* Vivo de Nansen - de Mota Padrao - A, IV, 92.6

DE LA FONTAINE, Jean - Fabloj - Thèvenin, Lucien - (1949a) A, IV, 83.8 : 81

FISCHER, Dro.P.Pius (O.S.B.) - Gvidilo Oberammergau kaj Ettal - Dr. Alb.

Kratzer (O.S.B.) - A, V, 91.

FLYGARE-CARLÈN, Emile - la Literaturisto kaj lia fianĉino - Zeidlitz, Otto W. - A, III?, 83.

GOGOL, N.W. - Portreto - Fiŝer, Andreo - A, IV, 83.8

GRUBB, Edward (M.A.) - la Societo de Amikoj kaj ĝiaj esencaj trajtoj - ? A, 1b, 28 : 23 : 22

JOELS, Jozefo - Panoramo de nia Movado - B, V, 84 : 408.92.

Nombroj pri Lourdes'aj vizitantoj

De Majo ĝis Novembro (lastjare), Lourdes akceptis 2.500.000 pilgrimantojn oficiale kalkulitajn de Grot-Oficejo. Por sama periodo 1951-a, oni estis kalkulinta 1.832.000. Ĉe la fervoj-stacio, oni montras, ke, dum la tri somermonatoj, 515 specialaj trajnoj alkondukis 28.285 gravajn malsanulojn el Franekaj-Belg-landoj (112 trajnoj), el Italujo (40 trajnoj), el Britujo, Germanujo k.t.p. Dume, en 1951, estis nur 416 'blankaj' trajnoj kaj 24.224 malsanuloj.

Ĉe aerstacio Ossun, 5.346 pilgrimantoj el la tuta mondo alteriĝis, la pasintan jaron, anstataŭ 1051 dum 1951. Krom tio, la statistiko memorigas Pilgrimon de Aviadistoj, kiu, - Junio 1952-, kunigis 4.000 partoprenantojn, el ĉiuj landoj.

Lourdes, kies loĝantaro estas proksimume 18.000 homoj, restas do la nekomparebla kunigejo por Kristana Mondo; ĝi fariĝas ja vera turisma platloko de Pirene-Atlantika regiono.

C.Royer.

Turisma faldprospekto aperis pri la urbo Thun (Svislando) havebla ĉe s-ro F. Schwarz, Wiesenstr. 1, Thun.

La Oficejo 'Propagando kaj Turismo' de la urbo Antwerpen en Belgujo eldonis prospekton pri la vidindaĵoj de la fama kaj monumentriĉa havenurbo.

* * *

s-ro Korf, prezidanto de la Haga Esperantista Komitato verkis propagandbroŝuron por la eldonejo 'Succes'. Jam 10.000 ekz. trovis la vojon al legantoj.

* * *

En la ataneaj salonoj de Montevideo (Urugvajo) okazis ekspozicio de Esperanto materialo. Vizitis ĝin pli ol 3000 personoj, i.a. lia ĉefepiskopa moŝto d-ro A.M. Barbieri, kiu impresita de la grava evoluo de Esperanto kiel lingvo internacia kun vasta aplikado kaj praktikaj servoj, proponis lian gravan apogon por instrui ĝin en katolikaj medioj kaj li mem klopodis ĉe la katolika radiostacio 'Sarandi' por disaŭdigo de propaganda prelego. Sekve de tio la prelego okazis kaj elparolis ĝin la frato de la ĉefepiskopo s-ro Ruben Barbieri. Ni eperas je grandaj efikoj.

* * *

La Katolika Aŭstria Verkista Unuiĝo 'Winfried' ekstarigis inter sia estraro Esperanto-sekcion por la fondigo de **katolika geverkista internacio**. Korespondemaj interesuloj, ankaŭ neverkistaj, bonvolu skribi por informo al 'Katholisch-Österreichische Schriftsteller-Vereinigung 'Winfried', WIEN X, Ferdinand Löwestrasse 13. Oni petas al diversnaciĵaj geesperantistoj multnombraj informpetoj por pruvi per tio, ke Esperanto vere taŭgas por internaciaj celoj kaj entreprenoj. por 'Winfried', F. Bischof.

* * *

La grava Nordfranca ĵurnalo 'Nord Eclair' publikigas ĉiudimanĉe Esperanto-kronikon. En 1952 ĝi aperigis 100 mallongajn novaĵojn pri la internacia Esperanto-movado; 18 ampleksajn artikolojn pri la gravaj okazaĵoj en Esperantujo (8 el ili kun foto); kaj 11-lecionan kurson. La ĵurnalo havas kristan-demokratan karakteron. Prizorgas la aferojn s-ro L. Giloteaux, 28 rue des Jardins, CROIX (Nord) Francujo, kiu petas fresdatajn informojn.

* * *

Turistoj povas ĉiam esti helpataj en jenaj konatoj nederlandaj lokoj: Formaĝvendejo en Alkmaar; Komunuma Muzeo en Amsterdam; Frans Hals Muzeo en Haarlem; Flor-aŭkcio en Aalsmeer; en la restoracioj de la Grandmagazenoj 'De Bijenkorf' en Amsterdam, Den Haag kaj Rotterdam.

* * *

Lau deziro nirepublikigas jenajn adresojn:

Estraro de I.K.U.E.


Prezidanto: rev. sac. A. Beckers, Kanaalstr. 9. OVERPELT-FABRIEK (Belgujo).
Sekretario-kasisto: L.G.C. de Jong, Utrechtseweg 81, VLEUTEN (Nederlando)
Help-sekretariino: f-ino T. Durenkamp, Kasperspad 91, DORDRECHT (Nederlando)
f-ino A. Begodt, Distelstr. 24, GENT (Belgujo)
rev. sac. Jean Vernoux SCJ, 34 rue Deufert Rochereau, LILLE (Francujo - Nord)
s-ro R. Colas, 13 rue de Mézières, PARIS 6 (Francujo)
d-ro Max. Führung, Gentsgasse 137, WIEN XVIII-110 (Aŭstrujo)
d-ro A. Halbedl, Schmittstrasse 17/II, KNITTELFELD (Aŭstrujo)
s-ro N.W. Vigar, 43 Defrene Road, SYDENHAM-LONDON SE 26 (Anglujo)
s-ro H.P. Saunders, 55 Knightsbridge, 4th Fl. LONDON SW 1 (Anglujo)
rev. sac. L. Thalmaier, Bahnhofstr. 18, GRÄFELFING bei München (Germanujo)
d-ro Max. Mielert, Untereschach, OBERHOFEN (14 b) (Germanujo)
rev. sac. M. Carolfi, OFM, Via Verulana 124, ROMA (Italujo)
s-ro A.L. Reni, Via Rovereto 6, VERONA (Italujo)
s-ro A. Llobet, Plaza des Martires 20, MANRESA (Hispanujo)
s-ro Eus. Maynar, Manifestacion 35-2, ZARAGOZA (Hispanujo)
rev. sac. G. Pausback, O. Carm., 4841 Woodlawn Ave, CHICAGO (Illinois USA)
d-ro W. Solzbacher, 11 New Avenue, YONKERS 4 (N.Y. - USA)
s-ro W. Przewolka, Av. Forest 1400-4^o piso, BUENOS-AIRES (Argentino)
s-ro A. Matubara-Hatirô, Nanmatu-tyô 24, KISIWADA (Japanujo)
Niaj reprezentantoj: (Al kiuj vi povas pagi ĉiajn sumojn ekz. abonoj, libroj
insignoj, kongreso, IKI, ktp. se vi ne povas pagi rekte al nia oficejo).
AŬSTRUJO: s-ro W. Mudrak, Beatrixgasse 19/9, WIEN III-40 pk. 105.713
BELGUJO: s-ro A. de Bosschere, Regentieplaats 3, St.-NIKLAAS-WAAS pk 74269.
BRITA IMPERIO: s-ro N.W. Vigar, Defrene Road 43, SYDENHAM-LONDON SE 26.
FRANCUJO: f-ino J. Le Boedec, 18 r. Ern. Cresson, PARIS 14. pk. 5815-56
GERMANUJO: s-ro P.H. Klein, Demrathkamp 28, (22a) ESSEN pk. 9040.
HISPANUJO: s-ro Angel Llobet, Plaza des Martires 20, MANRESA.
IRLANDO: s-rp Lorcan O'Uiginn, Ardmore Farmhill Drive, Roebuck, DUBLIN
ITALUJO: s-ro A.L. Reni, Via Rovereto 6, Verona pk. 9/16379
NEDERLANDO: kasisto 'Nederlanda Katoliko', Krugerlaan 195, GOUDA pk. 121449
USONO: s-ro P. Golobic, 17724 Grovewood Ave, CLEVELAND 19 (Ohio)
ARGENTINO: s-ro Przewolka, Av. Forest 1400-4^o piso, BUENOS-AIRES.



KORESPONDADO

s-ro Folkert Bijlard, Gooiberg 18, BUSSUM (Nederlando) k.ĉ.l. pri ĉ.t. kaj per il. pk.

'GVIDFOLIO de VERONA' estas havebla kontraŭ int.rpk. ĉe s-ro Am. L. Reni, Via Rovereto 6, VERONA (Italujo)



H. Bulthuis:	Inferio, romano pri Ameriko	bind. f	2.90
-	La Vila Mano, romano, ilustr.	bind.	3.40
x Burroughs:	Princino de Marso		1.20
v. d. Cammen pr.:	La Geedzeco, trad. T. Durenkamp, 78 pp.		0.25
Caporali:	Terni		0.10
Carolfi, sac.:	L. Padova Lilio (S. Antonio), ilustr.		0.50
-	La Reformanto (S. Francisko de Asisi) ilustr.		0.50
-	Preĝareto, la plej gravaj preĝoj, S. Meso ktp.		0.75
Carolus, sac.:	Tra la franciskana urbo Asisi, ilustr.		0.25
Chesterton:	La naiveco de pastro Brown, detektiva	bind.	3.10
Ag. Christie:	La murdo en la Orient-Ekspreso, detektiva		1.20